

PROGRAMO DE LA EKSKURSO AL

SUBTERA URBO OSÓWKA KAJ PREĜEJO DE PACO EN ŚWIDNICA LA 17AN DE MAJO 2017 – MERKREDO

* Starto de la ekskurso el Wrocław je la 7h30 apud tranoktejo, strato św. Marcina 12

* Vizitado de la Preĝejo de Paco en Świdnica www.kosciolpokoju.pl kune kun placo de Paco.

Preĝejo de Paco en Świdnica estas senduba grava trezoro de Malsupra Silezio. Ĝi estas unu el la plej grandaj lignaj preĝejoj en Eŭropo. En la jaro 2001 ĝi estis enskribita en la liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj de Unesco. Estante en la preĝejo kaj vidante ĝian belecon ni preskaŭ perdas parolkapablecon.



Preĝejo de Paco <http://kosciolpokoju.pl/kosciol/>



Placo de Paco <http://kosciolpokoju.pl/plac-pokoju/>

* Promenado tra Książański Park Krajobrazowy (natura parko de Książ), i.a. supreniro al loko, ekde kiu oni povas admiri la plej belan panoramon de la Kastelo Książ.



Natura Parko de Książ




Kastelo de Książ

* Traveturo al Osówka

* Vizitado de Osówka www.osowka.pl - oni devas piediri ĉ. 15 minutojn el la buso ĝis la muzeo.

Subtera Urbo Osówka (Osówka) estas unu el la plej interesaj kaj enigmaj subteraj allogaĵoj de Malsupra Silezio. Ĉiuj objektoj estis konstruitaj fare de Nazia Germanio en Góry Sowie, kiel la projekto Riese (Giganto). La celo de la projekto ne estas certa pro manko de dokumentaro.



Subtera urbo de Osówka

* Forveturo el Osówka kaj reveno al Wrocław.